La granda plimulto de la lingvoj – kaj en la mondo ili devus troviĝi proksimume 2300 – estas por la slovenoj nekompreneblaj; el tiu fakto foje estiĝas impresoj, ke en la horizonto de tiuj lingvoj okazas nenio literature aŭ science interesa. Kiel tia prijuĝo estas neracia kaj maljusta, oni povas vere vidi nur, se oni imagas, ke ankaŭ la slovena kultur kreado en la konscio de averaĝa, eĉ se kulture interesita germano, franco, anglo, ruso, ĉino ktp. estas same senkolora makulo, kiel tiaj ŝajnmakuloj estas por ni la regionoj en Afriko kaj Azio. Por Prešeren aŭ Cankar, por Kocbek aŭ Janĉar, por Rebula aŭ Capuder, por Januŝ kaj Lipuŝ – ne sufiĉas, se ili estas tradukitaj en la tn. »mondlingvojn« kaj aperas en la eldonkvanto de 300 aŭ 500 ekzempleroj (escepto

estas la tradukoj en la rusa), kiujn kutime aĉetas la tradukisto mem por ilin disdividi inter la amikoj. Ofte ni nin trompas per falsa slogano, kiel »la slovena literaturo konkeras la mondon«.

Tiel ni slovenoj estas kondamnitaj grandan parton de la mondliteraturo traduki pere de peranta traduko respektive lingvo. Kutime temas pri la lingvoj de la iamaj koloniaj nacioj, kiuj la unuaj havis kontakton kun pli aŭ malpli foraj popoloj kaj nacioj. Pli parte ni tradukas pere de la anglaj tradukoj, ja la lingvojn de aliaj du grandaj koloniaj nacioj, de la hispanoj kaj de la portugaloj ni pro la tradicia unuflanka lerneja lingvopolitiko preskaŭ ne lernis.

Slovena tradukisto tiel al la origina teksto estos fidela en plej bona okazo tiom, kiom fidela estis la unua, ĉu la angla, la franca aŭ iu alia tradukisto. Spite tion, ke ne estas jam bone pripensita pli filozofia ol praktika demando – ĉu la beletron oni vere povas traduki? – ni tamen povas diri almenaŭ, ke de la traduko ne troviĝas senco postuli perfektecon – kaj kiom perfektaj la originaloj mem estas? – kaj tiel estas pli racie simple konsideri, ke ĉiu traduko je pli malpli granda diferenco malidentigiĝas al la originalo. Al G. Flaubert oni atribuas ŝercan eldiron: La tradukoj estas kiel virinoj; se fidelaj, ili ne estas belaj, kaj se belaj, ili ne estas fidelaj... Tiu »nefidelo«, kiun ĉiu bona tradukisto de literatura verko devas pekofari, plej ofte estas ĝuste la interpretado, kiun oni ne povas kontroli, ĉar ne povante kompari kun la originalo, ja ne komprenantaj la originan lingvon. Sed eĉ se oni la lingvon scipovus, mankus la kono de la cirkonstancoj, el kiuj la teksto estis skribita. Oni scias, ke la tradukon ne influas nur la literatura arta interpretado, sed ankaŭ valorigado, la spirita fono, la idea bazo, ideologia kaj politika rigardo. Certe estas nereale atendi, ke la angla tradukisto konduku antaŭ la azia aŭ afrika originalo kiel disĉiplo kondutas antaŭ sia instruisto, kio estus normala kaj bezonata rilato. Mi ne diras, ke ne troviĝas ankaŭ tiaj spiritaj sintenoj kaj atingoj. Sed pli parte tamen temas pri ĉu konscia, ĉu nekonscia patrona rilato de la membro de renoma imperio al la aŭtoro, kiu en la plej bona kazo prezentiĝas kiel interesa indiĝeno. Estus utile prepari studon pri tio, kiom da valorigaj kaj mondperceptaj falsadoj kaŝiĝas en la lingve eble eĉ sufiĉe fidelaj tradukoj, el kiuj poste tradukas ankaŭ la slovenoj. Legante la aŭstrajn kaj la germanajn publikaĵojn mi ĉiam denove rimarkas, ke eĉ la sufiĉe bonintencaj raportoj ekzemple pri la slovenoj kaj pri la slovena literaturo, plenas je malveroj kaj duonveroj, karakterizaj por la germana rigardo super la slovenoj. Kompreneble ne okazas alie ankaŭ inverse, kiam la slovenoj raportas pri siaj najbaraj nacioj ...



Laĉni kamni (Malsataj ŝtonoj),  
Mladinska knjiga Ljubljana, 1988

La plej gravaj motivoj por uzi la esperantan tradukon estis tiuj ĉi: unue, Tagore siajn rakontojn verkis en sia bengala lingvo, por kiu la slovenoj verŝajne dum ankorau longa tempo ne havos sufiĉe kvalifikitajn tradukistojn; kaj due, la tradukisto el la bengala en la anglan, Lakshmisvar Sinha, estis la persona disĉiplo de Tagore en ties renoma lernejo en Santiniketano – kaj enkadre de tiu lernejo li pli poste mem estis instruisto. Kiel bengalo kaj senpera disĉiplo de Tagore li certe estis tre kvalifikita peranto de la vorto de Tagore por la legantoj ekster la Hindujo. Sinha estis ankaŭ lerta aŭtoro en Esperanto, en kiu li eldonis jam kvar librojn. Kaj la tria motivo troviĝas en la internacia lingvo mem, en ĝiaj strukturaj karakterizaĵoj, kiuj ebligas al Esperanto esti la plej oportuna peranta lingvo, ja multaj eksperimentoj pruvis, ke la perdoj de la signifo okaze de esperantlingva perado estas plej malgrandaj. Kio do faras, ke Esperanto estas la plej preciza kaj fidela peranto de beletra aŭ de scienca mesaĝo?

Antaŭ ĉio temas pri la sistemo de vortofarado kaj pri la rilato inter la morfologio kaj la sintakso. Ankaŭ la fiksjaj dirmanieroj, kiuj ne baziĝas sur ofte tre kaprica

kaj senlogika historia uzo, sed sur la ĝenerala homa logiko, kiu por ĉiuj popoloj estas la sama.

La lingvistiko dividas la lingvojn laŭ ilia strukturo je: aglutinaj (kiel la turka, la hungara), izolaj (kiel la ĉina, vietnama) kaj fleksaj (kiel la hind-eŭropaj kaj la semidaj). En praktiko neniu el tiuj tipoj estas pura. La nomoj – tre skize – signifas: ĉe la izolaj lingvoj ĉiu vorto estas el unu peco, iaspeca signifbriko sen interna strukturo kaj flekseco. Ĉe la aglutinaj ĉiu vorto havas internan strukturon, kiu estas tre konsekvenca; ĉiu elemento de la vorto havas sian konstantan signifon. Ĉe la fleksaj lingvoj – al ili apartenas ankaŭ la slovena lingvo – la vortoj havas same internan strukturon, tamen ne tiel konsekvenca kiel ĉe la grupo aglutina. Esperanto apartenas baze al la aglutina grupo, tamen ĝi parte resumas ĉiujn tri sistemojn. Ĉar Zamenhof laŭ siaj komencaj imagoj por la tuja uzeblo de la lingvo laŭ la maniero de kodsistemo, la ŝlosilo, por kio sufiĉus principe nur la vortaro, imagis la vortelementojn tiel, ke ili havas karakterizon de memstaraj vortradikoj, oni Esperanton povas vidi ankaŭ kiel izolajn, sed pro la morfologia solvo pliparte greka, ankaŭ kiel fleksan lingvon. Tio parte klarigas ĝian proksimumon por la ĉinoj, la vietnamingoj, la koreanoj, kaj ĝian konvenon por la komputilaj sistemoj. Sed la eŭropano ĝin tamen spertas kiel fleksan lingvon, parenca al la lingvoj de la romana grupo.

La derivsistemo, do la maniero formi novajn vortojn el la jam konataj vortradikoj, estas tia, ke por esprimi la saman enhavon oni bezonas proksimume kvinoble malpli da vortradikoj ol ekzemple okaze de la angla lingvo. La sistemo de kombinado, karakteriza por la lingvo germana, kaj aliflanke la sistemo de prefiksoj, kiel ĝin pli konsekvence utiligas la slavaj lingvoj, la tuto de ĉio tio donas al Esperanto flekseblon, precizon kaj niancoriĉon, kian aliaj lingvoj ne atingas.

Kiel ekzemplon mi volas doni la radikon *amuz-*, kiu esprimas larĝan bazan ideon pri amuzo, amuzeco, amuziĝo. Helpe de la substantiva finaĵo *-o* oni derivas la vorton *amuzo*. Per aliaj gramatikaj finaĵoj oni povas same ricevi aliajn vortklasojn kiel: *amuzo, amuze, amuzi*. Por ni estas interesa la verbo. Oni povas esprimi la saman ideon, tamen nuance, laŭ tri manieroj: *amuzi sin, amuziĝi, esti amuzata* respektive *amuzati*.

Esperanto diferencas de aliaj lingvoj ĝuste koncerne la tradukadon kaj interpretadon. Esperanto estas la nura lingvo, kie oni pli facile tradukas el sia gepatra lingvo en ĝin ol inverse, kiel tio estas ĉe ĉiuj aliaj lingvaj kombinoj. De kie do tiu ĉi paradokso, ja ĉiuj, kiuj pli serioze okupiĝas pri tradukado kaj interpretado, bone scias, ke multaj slovenoj estas kapablaj bone traduki eĉ

tre postulajn tekstojn el fremdaj lingvoj en sian slovenan, sed ke apenaŭ troviĝas iu, kiu kapablas suverene traduki tekston el sia gepatra slovena lingvo en lingvon fremdan. Kaj se iu tion tamen riskas fari, oni devas la rezulton sendi al lingva kontrolo kaj polurado al kontrolleganto, por kiu la cellingvo de la farita traduko estas ties gepatra lingvo. Kiel do, ke okaze de Esperanto la afero funkcias inverse?

Esperanto postulas por esti lernita je la sama nivelo proksimume dekoble malpli da tempo ol iu alia, do nacia lingvo. Ĝia morfologio estas konstruita laŭ la principoj de logiko kaj konsekvenco, sen esceptoj kaj neregulaĵoj. Tial oni la internacian lingvon povas relative rapide lerni ĝis la nivelo sen gravaj gramatikaj eraroj, krom eraroj pro supraĵeco aŭ malatento, kiajn oni faras same en propra gepatra lingvo. En kontaktoj kun esperantistoj mi rimarkis, ke ĉe la homo, parolanta Esperanton, ne estas tiel facile diveni pri ties instruiteco, kiel tio tuj montriĝas uzante la gepatran lingvon. La plimulto da tiuj, kiuj lernis la internacian lingvon sufiĉe serioze, parolas ĝin korekte kaj je la nivelo, kiun ili ĉe sia gepatra lingvo – por ne paroli pri fremda nacia lingvo – ne povus tiel facile atingi.

Tio, kion la lingva didaktiko ĉiam denove sugestas al tiuj, kiuj planas lerni fremdan lingvon, ke oni devus provi en la cellingvo laŭeble frue senpere pensi, okazas ĉe la lernado de Esperanto jam baldaŭ post la unuaj paŝoj. El tio sekvas ankaŭ la ekstraordinara propedeŭtika rolo de la lernado de Esperanto, ja en tiu kazo la sukceso aperas multe pli rapide, kaj tio tre favore efikas por la kontinua lernado.

Krom la logiko kaj simpleco respektive facila lerneblo forta faktoro, kiu faras tradukadon al Esperanto pli facila ol tradukadon el ĝi en nacian lingvon, estas la jam menciita ligo inter la morfologio kaj sintakso. Antaŭ ĉio la konsekvenca distingado inter la vortklasoj, el kiuj ĉiu havas propran karakterizan finaĵon, kaj la eblo tion fleksi, liberigas la frazon koncerne ĝian vortordon kaj faras ĝin libere adaptebla, sen tiel damaĝi la komprenon. La baza frazformulo en Esperanto estas lingve hindeŭropa: subjekto – predikato – objekto; sed antaŭ ĉio pro klara distingado inter la subjekto kaj objekto pere de la akuzativa finaĵo je *-n* oni povas la vortordon laŭbezzone variigi, per kio Esperanto similas al la malnovgreka sintakso. La vortordon tiel ne difinas la baza bezono de kompreneblo kaj sendubeco, kiel tio observeblas ĉe la modernaj eŭropaj lingvoj, sed nur la postuloj de stilistiko kaj metriko. Tial Esperanto estas la sola moderna lingvo, kiu povas simuli ĉiujn poeziajn formojn kaj metrikojn, ĉiujn stilajn nuancojn, ĉian frazmelodion kaj simile. Principe do Esperanto posedas

tri stilajn eblecojn: sekvi propran tradician stilon, kia estiĝis ĉe la klasikaj aŭtoroj en Esperanto, kanonigita en *Fundamento*; simuli karakterizojn kaj emfazojn de unuopaj naciaj lingvoj; kaj fine, simuli stilajn apartaĵojn de unuopaj aŭtoroj. Tiel oni povas karakterizan melodion de la frazo en la poezieca prozo de la slovena klasikulo Cankar traduki en Esperanton tiel, ke la leganto ĝin spertas, kvazaŭ legante ĝin en la originala lingvo. Bedaŭrinde pluraj esperantaj verkistoj kaj tradukistoj mem ne konscias pri tiuj ĉi avantaĝoj kaj ili pli ofte restas ĉe la kutima komuna stilo.

Dum tiel ĉiuj tradukoj – kiel en la anglan – estas tiaj, ke ili plene transprenas la strukturon de la angla lingvo, la tradukoj al Esperanto povas altnivele reteni la spiriton de la originalo. Principe ankaŭ por la tradukoj al Esperanto estas modelo la stilo de Zamenhof; sed se oni volas atingi apartajn efikojn aŭ reteni almenaŭ iom da lingva bravuro de la originalo, oni tion povas fari, sen per tio damaĝi la kompreneblon.

Tiuj ĉi du surprizaj karakterizoj de Esperanto: ke estas pli facile traduki al ĝi ol el ĝi, kaj ke oni per ĝi povas pli bone simuli la karakterizaĵojn de la originalo, tiel ebligas, ke la esperantaj tradukoj estas pli fidindaj, sen ke pro tio devus suferi la beleco. Sed antaŭ ĉio gravas, ke tiajn tradukojn ne faras fremduloj, kiuj certe povas bone finlerni la lingvon, per kiu la originala teksto estis skribita, sed ili ne povas tiel facile rekoni ĉiujn fonojn de la vivo, el kiu la verko fontas; tion povus pli bone diveni nur la samgentanoj, elirantaj el la sama kultura medio kaj vivcirkonstancoj. Traduko de lingva fremdulo povas esti nur pli aŭ malpli bona lingva traduko. Sed la traduko de la samgentano de la aŭtoro – kaj tia traduko krom maloftaj esceptoj estas ebla nur en la kazo de Esperanto – estas traduko, ĉe kiu estas konsiderata ankaŭ la plej eta indiko, desegnita ankaŭ la plej efemera fono, kion nur la samgentano povas diveni.

Tial ne estas strange, se ĝis la jaro 1969 (pli aktualajn informojn mi bedaŭrinde ne havas) en 25 lingvoj aperis pli ol 100 libraj verkoj, tradukitaj el 26 lingvoj tiel, ke la peranta traduko estis la esperanta traduko. La plej oftaj »ricevintoj« estis la nacioj en malproksima Oriento (rigardante el eŭropa perspektivo), kaj la plej oftaj »donintoj« estis la slavaj nacioj. Tiel la ĉinoj ricevis pere de esperanta traduko poemojn de Majakovski, la poeziajn rakontojn *Onjegin* kaj *La filino de kapitano* de Puŝkin, same la verkojn de Tolstoj, Gogolj kaj Gorkij. La japanoj ricevis tiamaniere la verkojn de Turgenjev, Tolstoj, Novikov kaj Drezen. El la pola lingvo la ĉinoj ricevis pere de la esperanta traduko la romanon *Faraono* de Prus, kaj la vjetnamanoj la epopeon de Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*. El la franca la ĉinoj ricevis



poemojn *La Sonorilo* de Lemaitre kaj la japanoj *Mateo Falkono* de Merime. El la itala la ĉinoj ricevis novelojn de la verkisto De Amicis, el la hispana *Sango kaj sablo* de Ibañez. El la germana la ĉinoj ricevis novelojn de Storm kaj la fabelojn de la fratoj Grimm; la japanoj ricevis el la germana la poemojn de Heine kaj la fabelojn de la fratoj Grimm. La mongoloj pere de esperanto ricevis la fabelojn de Andersen, la slovakoj el la norvega *Kon Tiki* de Heverdahle. La japanoj, la ĉinoj, la ĉeĥoj kaj la francoj la nederlandan dramon de Dehker *La mondo ne havas atendejon* ktp.

Ĉu Esperanto peris al la mondo ankaŭ verkojn el la slovena literaturo? Kompreneble. La ĉinoj tradukis la rakonton Servisto Bartolomeo kaj lia rajto el esperanta traduko, kiun antaŭ la dua mondmilito faris profesoro pri la latina Franjo Modrijan. Bedaŭrinde tio ne estis traduko de la kompleta novelo de Cankar, sed de la drama varianto, farita de Ferdo Delak.

Traduko de la noveloj de Tagore ne estas la unua traduko el Esperanta en la slovenan. Antaŭ la dua mondmilito aperis en la slovena traduko renome konata populscienca libro de Eugène Aisberg *Fine! Nun mi komprenas la radion!* verkita en Esperanto en la jaro 1926, cetere tradukita al pli ol dek lingvoj. Post la milito aperis slovena traduko de la vojaĝpriskribo de Tibor Sekelj: Nepal malfermas la pordon, verkita originale en Esperanto. En la slovena katolika semajngazeto *Nedelja* en Klagenfurt / Celovec aperadis kiel feljetono la biografio de Gandhi, verkita en Esperanto de Edmond Privat. Poste la teksto aperis libroforme ĉe la slovena eldonejo Mohorjeva en Klagenfurt / Celovec.

Ĉiuokaze la ĉeesta kolekto de la noveloj de Tagore estas la unua traduko de beletra verko el malproksima regiono pere de esperanta traduko en la slovenan lingvon.

La ekonomiko de la nacia rezono pledas por tio, ke investi al la esperantaj tradukoj de propra literaturo estas la plej bona longdaŭra investo. La slovenoj ne posedas sufiĉe da mono kaj da cerboj por kvalifiki plurajn centojn aŭ eĉ milojn da pintaj tradukistoj, kiuj povus traduki la slovenan beletran klasikaĵon al almenaŭ 12 lingvoj, kiuj proksimume kovras la legantan reton de la mondo. Sed dum relative maloonga tempo ili povus kapabligi ekzemple 10 pintajn tradukistojn, kiuj en malpli ol du jardekoj tradukus al Esperanto ĉion, kion la slovena spirito donis valoran ĝis tia mezuro, ke oni tion povus montri al la mondo.

Dum la traduka laboro el Esperanto funkcias glate kaj oni neniam sin ektrovas antaŭ nesolveblaj duboj kaj enigmoj, proksime al tio troviĝas ankaŭ tradukado el la

germana, sed tute alia estas la situacio traduki el la angla. Ĝuste la relative modesta gramatiko de la angla lingvo – surbaze de kiu multaj parolas malprave pri facila lerneblo de la angla lingvo, kie oni alfrontas ankaŭ la malpli logikan manieron meti la interpunkciojn – kaŭzas, ke oni subite troviĝas antaŭ la krucenigo, por kiu mankas tiel la horizontalaj, kiel ankaŭ la vertikalaj solvoj. Se por la aktiva uzo de la angla lingvo la plej granda problemo estas tre granda nombro da fiksjaj diraĵoj, idiomoj, kiuj ne estiĝis logike, sed pere de bildriĉaj kaj foje paradoksaj bildoj kaj el la historia tradicio de la lingvo, tamen la plej granda problemo por la pasiva uzo, do por la traduka laboro, estas la malfirmeco, plursignifo kaj eĉ kontraŭdireco koncerne la signifon de la vortoj en la angla vortaro. Kaj tiu problemo estas tiom pli malfacila ol la problemo de idiomoj, kiun oni kutime trovas menciita lige al malfacilo de la angla lingvo. Por solvi la enigmojn idiomajn troviĝas sufiĉe da dikaj idiomvortaroj, kiuj enhavas praktike ĉion, kio povus esti malfacilaĵo por la tradukisto, se tiu havas emon foliumi en ili kaj ne elekti la plej mallongan vojon. Alie, se temas pri la signifo de la anglaj vortoj. Foje neniu vortaro povas helpi. Ĝuste kontraŭe: ĉiu pli bona aŭ pli ampleksa vortaro kompare kun la antaŭa, la dilemon povas nur pli kompliki, sed la solvon la tradukisto devas fine trovi mem.

Tiel ekzemple en la novelo *Iam vivis reĝo* mi ne povis decidi, kiamaniere traduki la frazon: »*And if there is discovered anywhere the least little peep-hole of deception, the reader turns away with a prudish disgust, and the author is discredited.*« Ĉu tio signifas, nun tradukite al Esperanto: »Kaj se oni ie malkovras la plej etan spuron de *misa penso*, tiam la leganto sin turnas for kun esprimo de malestimo, kaj tiu la verkiston ne prenas plu por serioza.« Aŭ eble anstataŭ la »misa penso« devus esti »trompo«? La angla vorto *deception* povas signifi kaj misan penson kaj trompon. Tamen ambaŭ vortoj ne estas sinonimoj, ne estas nuancoj de la sama komuna signifo. Inter la trompo kaj misa penso troviĝas diferenco kiel inter korektado de la skribisto kaj pendumado de la krimulo. Pro la trompo oni estas kondamnita, pro la misa penso nur kritikata aŭ korigata. Ĉe tiaj ekzemploj la angla lingvo havas nur plu unu metodon: la kuntekston. Do serĉi la sencon de la frazoj antaŭ la dilema vorto kaj post ĝi. Plej ofte tio bone funkcias, sed ankaŭ tiel oni povas perdiĝi. Nenie estas skribite, ke la kunteksto konsistas el nuraj unusignifaj klaraj vortoj. Kaj foje la kunteksto, kiu povus lumigi la signifon de la duba vorto, estas simple la tuta rakonto, la tuta libro. Karakteriza ekzemplo en tiu ĉi senco estas la titolo de la novelo en angla lingvo: »The Sentence«, kion oni povas traduki

per: sentenco, prijuĝo, juĝo, kondamno ... Mi daŭre ne estas certa, ĉu la elektita varianto estas konvena. Por akiri kompetentan prijuĝon, oni devas legi la tutan rakonton. Okaze de supre citita frazo mi longe preferis traduki per »misa penso«, eble ankaŭ el subkonscia rezisto antaŭ emo tuj diskvalifiki tiujn, kiuj pensas alimaniere kaj oni tiel ĉiun neveron tuj difinas mensogo kaj misan penson trompo. Fine mi iĝis konvinkita de la kunteksto, en kiu Tagore diras, kiel »la pripensita kaj inteligenta mensogo de niaj samtempuloj ombrigas kaj mallumigas...« Tamen tio ne nepre estas ĉiam tiel. Ja Tagore povis pensi pri ambaŭ ebloj: misa penso kaj trompo... Da tiaj plursignifaj vortoj estis en la teksto multe. Mi menciu nur kelkajn el ili:

»limpid as a fresh bubbling spring« – pura kiel *freŝe bobelanta akvofonto*; kiel: *bobelanta printempo* aŭ: *bobelanta florburĝono*? Povus esti la unua, la dua kaj la tria ebloj!

»plant« – *kreskaĵo, planto, laboreja ekiparo, trompaĵo ...*

»toil« – *pena laboro, lazo, pugno, en la ungegoj de ŝuldoj ...*

»mate« – *kamarado(ino), edzo(ino), masklo(femalo), unua oficiro sur la komercoŝipo, geedziĝi, seksumi, ŝakmati ...*

»request« – *peti, postuli (esenca diferenco!) ...*

»offence« – *krimago, ofendo (en Anglujo esenca diferenco, en totalismaj ŝtatoj praktike la sama afero ...)*

Mi surlistigis kelkajn ekzemplojn, kie la signifoj troviĝas inter si en kontraŭdiro. Mi troigus, se mi skribus, ke pro tio oni el la angla ne povus fidele traduki. Kompreneble oni tion povas, sed la tempo kaj la energio, kiuj en okazo de proksimume samnivela lingvoscio estas perditaj, estas senkompare pli grandaj ol se oni tradukas el Esperanto. Ankaŭ la scio pri la materio, pritraktita en la koncerna teksto devas esti, se tradukate el la angla, pli larĝa kaj samtempe pli preciza ol se tradukate el Esperanto, kie jam la lingvo mem estas sufiĉe klara kaj miskompreno preskaŭ ne povas troviĝi.

Bedaŭrinde inter la tro entuziasmaj esperantistoj kaj inter la eble nur pri sia propra instruiteco pensantaj pledantoj kaj instruistoj de la angla lingvo regas superflua miskompreno, kvazaŭ ambaŭ lingvoj pretendus atingi la saman aferon kaj tiel unu devas batali kontraŭ la alia. Tiuokaze oni devus la anglistojn konsoli, ke la angla lingvo senrigarde pri la pli ampleksa aŭ malpli ampleksa sukceso de Esperanto en proksima estonto restos grava kaj civilize kaj literature super ĉi

riĉa *mondlingvo* kun domina pozicio, kian ebligas al ĝi la ekonomia, politika kaj militeca unuarangeco de la nacioj, kiuj ĝin parolas. La konata sociolingvisto Chomsky okaze diris proksimume tiel: La *mondlingvo* estas la slango, parolata de la milita maristaro de Usono ... Certa lingvo do ne estas *mondlingvo* pro siaj esprimkvalitoj, sed pro la kvanto da ŝtalo, kiun dum unu minuto povas elpafi la kanonoj de ĝiaj parolantoj. Kiam la historio elmanigos la stafeton de dominado al iu alia nacio, tiam ankaŭ la angla lingvo revenos en sian naturan riverliton, kiel nun okazas pri la lingvoj franca kaj germana. Sed eĉ en tia okazo la angla daŭre estos la lingvo de unu el la plej produktivaj civilizacioj kaj literaturoj en la mondo – kaj bonaj anglistoj ne restos sen laborloko.

Sed ankaŭ al la tro zorgantaj esperantistoj oni devas same tiel diri, ke Esperanto ne pretendas akiri la dominan postenon de la *mondlingvo*, kiu lige kun la potenco kaj renomo nun estas tiu ĉi, poste iu alia, sed volas esti *neŭtrala internacia* lingvo kun sia nemalhavebla *interna ideo* pri frateco kaj egalrajteco de ĉiuj homoj kaj nacioj, kio prezentas plene alian aferon. En tiu ĉi senco la konkurentoj kaj kontraŭaj aferoj ne estas la lingvoj de la dominaj nacioj, ja iliaj potencoj mem inter si haltas kaj detruigigas, sed la ĝis nun ne sufiĉe evoluita sento pri la tuteco kaj interligiteco de la mondo, pri la kriterio de justeco por solvi la lingvan problemon, kaj la fakto, ke oni la enradikiĝintajn antaŭjuĝojn pli malfacile dispecigas ol la atomon, kiel sin esprimis Einstein. La historia sperto instruas, ke ĉiu potenco malkreskas kaj forpasas, sed la espero restas. Tial la esperantistoj ne vetas je io, kio ne havus eblon.

Ke ambaŭ lingvoj povas ankaŭ afable unu la alian rigardi, ne atestas nur la fakto, ke la movado de esperantistoj estas pli ol averaĝe prezentita ĝuste sur la brita insulo, kaj ke la brita parlamento estas la nura parlamento en la mondo, en kiu troviĝas la deputita klubo kun la celo subteni Esperanton, kun pli ol 200 anoj, sed ankaŭ apero de libroj, kia tiu ĉi estas. Tagore certe havus pro ĝi tre fortan ĝojon. La angla lingvo estis por li io tre valora, ja li estis per ĝi edukita; kaj kun simpatio li rigardis ankaŭ sur la fenomenon de Esperanto, kiu en tiu tempo faris siajn unuajn paŝojn ...

### Alskribo post 33 jaroj ...

Nuntempe mi pri la sama temo kelkajn pensojn formulus alimaniere. Pri Esperanto, eĉ aparte pri la (ne)verŝajno de ĝia ĝenerala akcepto, mi nun havas, »laca pro luktoj« certe pli singardan kaj sobran penson, pri kio ne kulpas la lingvo de Zamemhof, sed la homa

naturu kaj tiel ankaŭ la naturo de la nacioj kaj iliaj povoelitoj. Nuntempe mi ĉi tie staras antaŭ paradokso. Kiel unuflanke antaŭ miaj okuloj falas la tradiciaj konstruaĵoj de la esperanta movado, aliflanke tamen la propra literatura kaj traduka fondusoj de esperantaj libroj kaj publikaĵoj riĉe kreskis; kaj en la tutmonda elektronika reto nuntempe tiu ĉi lingvo estas pli viva ol en la pli bonaj pasintaj tempoj, kiam la teksto supre estiĝis, la esperantistoj povis imagi. Cetere en nia nuna tempo oni pli bone ol iam ajn scias, ke certigoj de daŭra ekzisto troviĝas nek por la plej disvastigitaj lingvoj; ja eĉ la centmiliono germana lingvo nuntempe rekte degelas sub la ĉiam pli dikaj tavoloj de la angla lingvo, kvankam sur la tutmonda nivelo la angla lingvo mem jam cedas al la lingvo ĉina – kaj tiel Esperanto ne troviĝas en la aro de etaj endanĝerigitaj lingvoj, sed ĝi troviĝas en la aro de la homaj lingvoj, super kiuj oscilas la Damokla glavo de ebla malapero. Ankaŭ Esperanto ne povas eskapi la ĝeneralan maldaŭrecon de la mondo kaj tiel same de la lingvoj. Kiam la tempo de ĝia ekzisto estos for, tion oni nuntempe ne povas diri kaj pri tio ankaŭ ne indas turmenti kapon.

Tiom da jaroj post la supra teksto oni ankaŭ scias, ke da lingvoj en la mondo estas multe pli ol en tiu tempo oni konstatis, nome, ĉirkaŭ sep mil! Multaj aferoj estas nuntempe por Esperanto malpli oportunaj. Sed aliflanke malfermiĝas novaj ebloj, kiaj tiam ne jam troviĝis. Tiel ĝis nun partoprenis la komputilan kurson de Esperanto »duolingo« en la angla lingvo jam preskaŭ du milionoj da lernantoj, kio estas forta surprizo por la esperantistaro mem. Nuntempe tiu kurso troviĝas jam ankaŭ en la lingvoj hispana, portugala kaj franca, kaj oni preparas ankaŭ versiojn en aliaj lingvoj, kiel en la germana, rusa ktp.

Kaj el la slovena literaturo estis en tiu tempo tradukitaj kelkaj ŝlosile gravaj literaturaj verkoj, kiel *La domo de Dipatrino* de Ivan Cankar, la poemkolekto *En ora boato* de Sreĉko Kosovel, la romano de Boris Pahor *Pilgrimanto inter ombroj* (Nekropolo), romano de Andrej Capuder *La vipo kaj la turbo*, la poemkolekto de la poeto France Prešeren *Girlando de sonetoj*, romano de Lovro Kuhar-Prežih *Doberdo*, rakontoj por infanoj de Tone Partljič *Mi volis tuŝi la sunon*, la esenca parto el la unua slovena libro, Katekismo de Primuso Trubero (1550), Prediko pri la kredo, filozofia traktaĵo de Miklavž Ocepek *Totalismo kaj tempo*, historia romano de Ivan Tavčar *Kroniko de Visoko*. Kelkaj tradukoj ankoraŭ atendas en la memordiskoj de la komputiloj ĉe la tradukistoj ...

La »poemo figuranta« (pokalon) *Tosto* de France Prešeren estis verkita je la novjaro 1844. Pro la liberala enhavo la cenzuristoj de la Aŭstra Imperio malpermesis ĝian publikigon ĝis 1948, sed ankaŭ poste la poemo estis elpelata el poemkolektoj de la aŭtoro. Eĉ en 1896 la ampleksa poemkolekto de Prešeren ne enhavis la *Toston*.

La Republiko Slovenujo difinis la sepan strofon de *Tosto* la teksto de la nacia himno.

**France Prešeren (\* 1800-12-03 † 1849-02-08)**

### **Tosto (Zdravljica)**

El la slovena: Tone Logar

1.

*Amikoj, jam sur vitoj  
finkreskis dolĉa vinstimul',  
ekvivos niaj spritoj,  
ekĝojos koro kaj okul'.  
Estos for  
ĉiu hor  
estanta en la brust' dolor'.*

2.

*Al kiu toston koran  
unue, fratoj, kantu ni?  
Ke nian landon gloran,  
slovenan landon gardu Di',  
ĉiujn nin  
en la sin',  
gefilojn de la fampatrin'!*

3.

*Fulmbatu malamikon  
el nuboj tondro kaj tempest';  
ke tenu fortan ligon  
slovenoj ĉiuj en honest',  
el katen'  
ilia man'  
liberon trovu en kompren'.*

4.

*Feliĉo kaj akordo  
al ni revenu unuec',  
la gent' de slava mondo  
kuniĝu en la bela dec',  
ke valor'  
kaj honor'  
denove nia estos glor'!*



5.

*Ke vivu sloveninoj  
ja estas ĉiu bela flor';  
tre belaj junulinoj,  
de sango nia la dekor',  
via fil'  
en la bril'  
kuraĝa estu sen humil'!*

6.

*Nun trinku je la tosto  
junuloj, kara nia ben';  
de hejma amagnosko  
ne prenu for, la mortvenen',  
ĉar nun vin,  
same nin  
la tempo vokas al defend'!*

7.

*Ke vivu ĉiuj gentoj  
eksopirantaj pri la hor',  
ke trans la kontinentoj  
disput' el mondo estos for;  
en liber'  
ne barbar',  
ĉe limo estu nur najbar'!*

8.

*Amikoj, nun sen flatoj  
je nia, glasojn levu, san'!  
Fariĝis ni gefratoj,  
en koro estu varma am',  
en belson'  
kaj rezon'  
ekvivu ĉiu bona hom'!*

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj


## Objave v slovenskih medijih

**Revija Gea, avgust 2021**, je na strane 6 – 13 objavila obsežen članek *Pri devetnajstih je povezal svet* naše nove članice in marljive teĉajnice Luĉke Lešnik. Ĉlanek, ki je bogato opremljen s slikami, ima veĉ delov, od katerih eden predstavlja idejo mednarodnega jezika esperanta, drugi znaĉilnosti jezika, tretji govori o vnetem uĉitelju esperanta Petru Grbcu ter nazadnje en del o motivu in vzpodbudi avtorice, ki stopa po poti svoje-ga oĉeta Rudija Lešnika, esperantista s Kozjanskega. Veĉ o tem v rubriki *Iz zgodovine gibanja / El la movada historio* in v naslednji ŝtevilki naŝega biltena. **O.K.**

## Fotokonkurso »Kroatujo el via okulo«

Enkadre de la 6-a Memorialo Lucija Borĉiĉ la 12-an de novembro, kiun rete partoprenis 24 personoj, inter ili du slovenoj, oni proklamis la gajnantojn de la 2-a fotokonkurso »Kroatujo el via okulo«.

La ĵurio envicigis la alsenditajn fotojn en 6 klasojn kaj pritaksis po tri premiojn en ĉiu klaso. En la klaso »urboj« la trian premion gajnis Ostoj Kristan, membro de ES Ljubljana, pro la bildo »Moderna sunhorloĝo (somera kaj vintra tempo) en Postira, insulo Braĉ«. La sama aŭtoro gajnis la duan kaj la trian premiojn en la klaso »naturo« pro la bildo »Panoramo de Levrnaka« respektive »Vinberejoj sur Jakljan, Elafitoj«. La aliaj klasoj estis »historiaj fotoj«, »sakralaj temoj«, »monumentoj« kaj »homoj kaj vivo«.



La premiita foto *Panoramo de Levrnaka* (Foto O. K.)

La aŭtoro deklaris: »Mi estas tre feliĉa. Mi sendis kvar fotojn kaj mi gajnis tri premiojn. La fotojn mi faris per saĝa poŝtelefono, sen stativo aŭ aldona lenso.« **O.K.**

## Oficiala revuo de Unesko, eldonata en Esperanto de UEA

Unesko-Kuriero, eldonata fare de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), aperas kvarfoje jare en sep lingvoj. Ĝi antaŭenigas la idealojn de Unesko, diskonigante ideojn pri internacie gravaj temoj, konforme al ĝia mandato.

La papera versio estas aĉetebla ĉe libroservo de UEA.

**Volontulaj tradukistoj** el la UN-lingvoj (araba, angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa) aŭ portugala lingvo, kaj provlegistoj por aliĝi al la teamo de Unesko-Kuriero en Esperanto, bv. kontakti la kunordiganton Trezoro Huang Yinbao.

**Donaco** al la fondaĵo Unesko por subteni Esperantigon de la Unesko-Kuriero kaj ĝia paĝaro ĉe Unesko-retejo, eblas en [la retejo de UEA](#).

**Abono** ĉe la libroservo de UEA aŭ la redakcio. Jarabono: 50 eŭrojn. La reta versio estas senpaga.

**Redakcio:** Unesko-Kuriero, Esperanto-Centro Ora Ponto, Shijieyu Zhongxin, Jingchuan-Xian, 744300 Pingliang, Ĉinio; **Retadreso:** [trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com), **Tel:** +86 18893316800, +86 933-3329289, **Skajpo:** huangyinbao, QQ552319856.

**Redaktoro:** Trezoro Huang Yinbao.

La revuo estas libere elŝutebla, uzu la ligilon [https://uea.org/revuoj/unesko\\_kuriero](https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero).

### Jarkotizoj de SIEL kaj ESL

Letna ĉlanarina **ZES** za individualne ĉlane je 12 € za zaposlene, 6 € za ŝtudente, upokojence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Ĉlanarino ali prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun ZES pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpiŝete »char« in namen plaĉila: »priimek, ĉlanarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci prejmnika vpiŝete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna ĉlanarina **ED Ljubljana** ostaja na ravni iz prejŝnjega leta, to je 12 € za zaposlene, 6 € pa za brezposelne, upokojence in ŝtudente. Ĉlanarino ali prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun EDL pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte ŝe navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. **O.K.**

### Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos meze de februaro 2022, ni antaŭvidas la raportojn pri la vintraj aranĝoj en Esperantujo (ekzemple Zamenhofa Tago) kaj kelkajn gravajn anoncojn. Krome ni atendas artikolojn pri:

- la 100-jara jubileo de ESL
- esperantaj kursoj en Slovenujo
- la malfermo de la faka biblioteko de SIEL
- la eldono de *La kroniko de Visoko*
- unuafoja aperigo de la dramo *Tranĉileto*
- el la historio de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiu povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...



**Feliĉajn Kristnaskon kaj Novjaron!**

**La jaro 2022 estu plena je sano, paco kaj sukceso!**

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Zdrufenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Ŝtefanova 9, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična ŝt. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni raĉun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoĵ Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaŝ Longyka.

**ISSN 2385-992X** Naklada / eldonkvanto: 60

**ISSN 2385-9628** URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>